

| | | |
|--|---|-------------------------------------|
|  | <h1>PENSEO</h1> | <i>N-ro 115</i> <i>Majo/2001</i> |
| | Monata Beletra Revueto en Esperanto Honorita de Premio Grabowski, 1994 | |
| Fondita en 1990; Enretigita en 1997 www.anteo.domainvalet.com | | |

Avidulo

Mo Xiaomi

La plej animskua amo inter li, beleta junulo kaj ŝi hontema junulino okazis en universitata tereno, sed la amafero rikoltis nenian rezulton. Proksime al diplomiigo, alia kunlernantino lin ĉasadis manie. Tamen li ne malsatis ŝin, kaj pli grave, li sciis, ke ŝia familio estas la plej bona apogilo por li akiri sukcesojn en lia kariero. Post kiam li faris kelkfojan pripensadon, lia racio finfine konkeris lian senton. Kaj li edzinigis la kunlernantinon, kiun li ne amis.

El tio rezultis, ke lia kariero disvolviĝis glate kaj sukcese, kaj li gajnis ambaŭ famon kaj profiton. Lia edzino lin amis, helpis kaj adoris, dum li apogis, dankis kaj fidelis al ŝi. Unuvorte, en alies okuloj, ĉio lia estis perfekta kaj enviiga.

En la jaro, kiam li aĝis okdek jarojn, li subite trovis la mankon en sia vivo. Komence li sentis la mankon malklare, kaj poste li trovis, ke la manko breĉiĝas pli kaj pli ĝis kiam li ne povas ŝtopi ĝin. La manko estis amo! Li malkovris, ke la kontentiĝo de lia vantamo estis pli grava ol lia amo je la aĝo de dudek ĝis tridek jaroj, ke la ekspansiigo de liaj famo kaj profito estis pli grava ol lia amo je la aĝo de kvardek ĝis kvindek jaroj, kaj ke alies adorado kaj estimado al li estis pli grava ol lia amo je la aĝo de sesdek ĝis sepdek jaroj. Kiam li trapasis la sojlon de la aĝo de okdek jaroj, li subite trovis, ke ĉio fariĝas ne grava plu, kaj plej gravas nur la amo, kiun li perdis antaŭ sesdek jaroj.

Tiel la grandaĝulo faris surprizigan decidon eksedziĝi kaj li edzinigis la honteman junulinon.

Nelonge post geedziĝo la maljunulino mortis. Duonon da tempo, dum kiu li kaj ŝi kunvivis, li pasigis ĉe la rando de ŝia malsan-lito.

Kun granda korŝiriĝo, lia eksedzino forvendis

ĉiujn havaĵojn kaj veturis por vivi kun siaj gefiloj, kiuj rezidis eksterlande delonge. Kaj nun li fariĝis sengroŝa denove.

Kelkaj estis kortuŝitaj pro tio, dum aliaj mokis lin pro lia malsaĝeco. Li tamen sin montris indiferenta. Li ĝoje diris, ke nun nenio mankas al li kaj li mortos sen bedaŭro.

Se li selektus la amon antaŭ sesdek jaroj, kio rezultos el tio? Eble lia kariero renkontus malsukceson kaj li retus en obskureco, eble li sentus deprimiĝon kaj lia amo dekoloriĝus tagon post tago, kaj eble li havus nenion.



Sed fakte li havis ĉion—famon, pozicion, familion, gefilojn, entreprenemon, senton de respondeco kaj ĉiaĵojn enuigajn, kiujn ĉiuj sukcesuloj devas posedi kaj havi. Kaj fine li volis akiri amon kaj romantikecon.

Ververe li estis avidulo. Ĉu eblas, ke ĉiuj sukcesuloj estas avidaj?

elĉinigis Hongjia

☆☆ ☆☆ ☆☆

El «LAŬZI»

ĈAPITRO 21

(En tiu ĉi ĉapitro Laŭzi priskribas karakterizaĵojn de la Taŭo. Senforma kaj senbilda, la Taŭo estas nevidebla, sed ĝi efektive ekzistas kaj produktas miradojn da estaĵoj.)

La enhavo de la granda Virto

Estas konforma nur al la Taŭo.

La io, kiu estas nomata Taŭo,

Havas nenian difinitan formon.

Tiel svaga kaj neperceptebla ĝi estas,

Tamen en ĝi la bildo aperas.

Tiel neperceptebla kaj svaga ĝi estas,

Tamen en ĝi troviĝas io efektiva.
 Tiel profunda kaj obskura ĝi estas,
 Tamen en ĝi estas tenata la subtila esenco.
 La esenco estas tre konkreta,
 Kaj en ĝi estas latentia io vera.
 De la pratempo ĝis la nuno
 Ĝia nomo ĉiam restas,
 Per kiu oni ekzamenas la originon de ĉiuj
 estaĵoj.
 Kiel do oni ekkonas la originon de ĉiuj estaĵoj?
 Per la naturo de la Taŭo.

ĈAPITRO 22

(La unuaj ses frazoj estas antikvaj popoldiroj, kiuj venis el la tempo antaŭa al Laŭzi. En ili estas entenata la jena dialektika penso: ekzamenante demandon, oni devas preni en konsideron kiel la aspekton pozitivan, tiel ankaŭ la negativan. Laŭ Laŭzi tio povas esti sekvata kiel principo en la observado de la socio. Per la popoldiroj Laŭzi konsilas al ni esti cedema kaj nekonkurema, ĉar per cedoj kaj nekonkurado oni povas atingi la rezultojn, kiujn aliaj kutime ne povas atingi. Ankaŭ tio estas la apliko de lia principo de retiriĝo por antaŭeni.)

“Estu cedema, kaj vi konservos vin tuta;
 Estu fleksebla, kaj vi restos rekta;
 Estu malplena, kaj vi fariĝos plena;
 Estu kaduka, kaj vi renoviĝos;
 Prenu malmulton, kaj vi ricevos;
 Havu multon, kaj vi konfuziĝos.”
 Tial la Saĝulo¹ tenas sin je la Praa Unuo, la Taŭo,
 Kaj uzas ĝin kiel la kriterion por juĝi ĉion sub la
 Ĉielo.
 Estante neelmontriĝema, Li havas gloron brilan;
 Ne konsiderante sin ĉiam prava, Li estas
 prudenta;
 Ne farante fanfaronojn, Li estas merita;
 Ne fierante pri si mem, Li estas eminenta.
 Ĝuste ĉar li ne konkuras,
 Neniu en la mondo povas konkuri kun li.
 Kiel do povus esti malplena frazo la antikva
 popoldiro:

“Estu cedema, kaj vi konservos vin tuta”?
 Tenante sin je la Taŭo, oni ja povas konservi sin
 bone.

¹ Vd. noton 1 de ĉap. 2.

Trad. Wang Chongfang

El 《Poemoj》

Ĉirpantaj Akv-birdoj

Akv-birdoj ĉirpas
 sur dun' rivera.
 Knabino bela,
 vin mi sopiras.



Enakvaj kresoj
 sub man-plukado.
 Knabino bela,
 vin mi prisonĝas.
 Sapiro vana
 inklino spronas.
 Aspir' insista
 ne dormon konas.

Enakvaj kresoj
 sub man-plukado.
 Knabino bela,
 por vi mi liru.
 Enakvaj kresoj
 sub man-plukado.
 Knabino, mi vin
 gonge admiru.

elĉinigijs Telo

Ĉi Tio Ankaŭ Estas Ĉio

Shu Ting



Ne ĉiuj arboj grandaj
 rompiĝas sub la ŝtormo;
 ne ĉiuj semoj
 ne povas trovi grundon por radikoj;
 ne ĉiuj veraj sentoj
 sorbiĝas en dezerto de la homa koro;
 ne ĉiuj songoj
 volonte rompas sian flugoparon.
 Ne, ne ĉiuj,
 ne kiel vi asertas,



Rideto al floro

Liu Liangcheng

Kiam mi returnis mian kapon, la herboj malantaŭ mi jam floris en vasta areo. Ŝajnis, ke la ŝerco dirita de iu ridigus la herbojn.

Tiam mi cerbumis, sternante sur la montdeklivo. Mi ne sciis, ĉu tiuj strangaĵoj en mia penso faris la herbojn ridi, eĉ ridegi skuante sian korpon en zefiro. Kaj iuj el ili eksplodis per ridego kaj aliaj retenis sian rideton en la firme fermitaj lipoj. Proksime al mi estis du floroj. Unu el ili turnis al mi sian vizaĝon kun disigitaj maldikaj rozkoloraj petaloj, kvazaŭ eligante agrablajn mallaŭtajn ridvoĉojn. La alia deturnis siajn kapon kaj vizaĝon, sed ne povis kaŝi sian ridan mienon. Mi nereteneble ekridis, unue ridetis kaj poste kluke ridegis.

Tio estis la unua fojo por mi voĉe ridi en sovaĝejo.

Aliafoje, mi dormis en la verdaj herboj sude de la tritika kampo. Mi tre ŝatis tiun larĝan pecon da herboj, malhele verdaj, prezentantan okulfrapan kontraston kun la ĉirkaŭa sovaĝejo velkeflava.

Eble antaŭ unu monato, mi pensas, tiu, kiu zorgis pri akvumado de tritik-kampoj, nebone regis akvofluojn aŭ foriris por dormo post kiam li enlasis akvon en la tritik-kampojn. La akvo superfluis kamprandon kaj kuris malsupren laŭ la dika fosaĵo. Sovagaĵaj herboj velkiĝintaj multajn jaroj finfine sukcesis en atendado de ŝanco por reviviĝo. La verdeco akumuligis multajn jaroj, samkiel la soifeco en miaj okuloj. Kvankam mi ne povis, kiel bovo, ĵetis min antaŭen por trinki ĝissate, mi tamen dormis dolĉe tie en la verdj herboj. Ankaŭ tio estis kontentiĝo, se mi dormis kune kun tiaĵoj ŝatataj de mi kaj havis sonĝon.

Kiel homo, kiu laboris dum sia duona vivo en la velkeflavaj kampoj, mi finfine ĝisatendas la jaron kun freŝe verdaj herboj. Ĉu tiuj verdaj herboj povus daŭrigi sian freŝecon ĝis kiam mi distingiĝos?

Ĉu en la okuloj de tiuj herboj, kiuj simple elkreskas kelkajn foliojn, elpuŝas kelkajn sprosojn kaj prosperas nur per kelkaj floretoj, kaj kiuj neniam

kreskas altaj kaj neniam fariĝas dens-densa, jaron post jaro prezentiĝas senescepte deprimio el miaj rid-manka mieno kaj malviglaj paŝoj?

Mi vivas tro serioze. Mia senesprima vizaĝo jam fariĝas apatia al ekzistado kaj mi jam forgesas montri rideton al floro kaj nova ŝoso. Probable mia rideto servis kiel bonvenigo kaj kuraĝigo al tiuj humilaj vivoj, kiuj nefacile aŭ malfacile elkreskas en la sovaĝejo, samkiel la freŝe verdaj herboj faris min rigardi la belan perspektivon, kiu ankoraŭ ne venis.

Kaj poste mi konsideris, ke mi jam apartenas al la sovĝejo. Fakte, ne estas facile eniri la sovaĝejon. Kvankam ĝia pordo vaste malfermiĝas antaŭ vi, kiam vi penas eniri, vi tamen eliras senkonscie kaj ree staras ekster ĝia pordo. Ĝiaj detaloj ĉiam firme firmiĝas al vi.

Eble la vojo por vi alproksimiĝi al herbo, akvero aŭ insekto estas longa. Por koni herbon, tio estas pli ol ŝovi ĝin en vian buŝon kaj gustumi ĝin. Faru foston, plantu vin mem en ĝi, ŝprucigi iom da akvo kaj staru rigide en ĝi kelkan tempon. La sento, kiun vi ekhavas, estas doloro en femuroj, sed vi ne povas aserti, ke herboj, kreskante en la tero, havas la saman kazon kiel vi. Homoj ne havas tiel longajn radikojn kiel herboj, kaj ili neniel povas koni la situacion en la profunda tero. Ili dronas en siaj propraj aferoj ĝis super la ŝultroj Kiam ili elfaras la aferojn unu post alia, ili sin montras videblaj iom post iom.

El herboj mi konis nur kiel homoj devas konduki, sed ne kiamaniere herboj bone kreskas. Mi mem kredas, ke mi konas ilin, sed fakte mi sukcesas koni mi mem. Mi neniam konas ilin.

elĉinigi Mang Lu

Eldonas Redakcio de *Penseo*
 Adreso: s-anino Harpina WU
 Poŝtkesto 136, Jichang-xi,
 Guangzhou, Ĉinio, CN-510403
 E-poŝto: harpina@21cn.com
 Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Veĵdo)
 Adreso: Fremdlingva Fakultato, Shantou
 Universitato, Guangdong 515063, Ĉinio
 Tel: (0754) 2903012 (hejme)
 E-poŝto: wyd168@21cn.com
 Ĉiujn kontribuojn al la ĉefredaktoro.
